WIKIPEDIA

Tokelaa lingvo

La **tokelaa lingvo** estas aŭstronezia lingvo, kiun parolas ĉirkaŭ 1 500 homoj en la atoloj de Tokelao, teritorio de Nov-Zelando. Ĝi apartenas al la polinezia lingvaro kaj havas gravan rilaton kun la tuvala. Kune kun la angla ĝi estas la oficiala lingvo en Tokelao. Ĝi ankaŭ estas parolata de proksimume 2 900 tokelaanoj vivantaj en Nov-Zelando. Loimata Iupati, tokelaa ministro pri edukado, estas tradukanta la Biblion en la tokelaan.

Tokelaa lingvo	
Parolata en	Nov-Zelando
Regiono	Tokelao
Parolantoj	3 300
Skribo	Latina
Lingvistika klasifiko	
Aŭstronezia	
Malajo-polinezia	
Oceania	
Centra kaj orienta	
Polinezia	
Tokelaa	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Tokelao
Lingva statuso	4 severe endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	tkl
ISO 639-3	tkl
Glottolog	toke1240
Angla nomo	Tokelauan
Franca nomo	tokelau

Kelkaj vortoj kaj frazoj en la tokelaa:

- Saluton. = *Malo ni.* / *Tofaa.* / *Taloha.*
- Kiel vi fartas? = *Ea mai koe?*
- Mi fartas bone. = *Ko au e lelei.*
- Bonvolu. = *Faka molemole.*
- Dankon. = *Faka fetai.*
- Jes. = *Lo.*
- Ne. = *Heai.*
- La vetero bonas. = *Te manaia o te tau.*
- Vi frenezas! = *Koe te hoho!*
- Ne kuru tiel rapide! = *Koe na he vili lahi!*
- Ne plu dancu! = *Fakauma te hiva!*

Eksteraj ligiloj

- La tokelaa ĉe Ethnologue (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=tkl) (angle)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tokelaa_lingvo&oldid=6291418"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:26, 24 mar. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.